# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Februaro : 2 2022


## LAŬ HISPANA JUĜISTO NE ESTAS DEVIGE LERNI EGE MALFACILAN LINGVON

En la monato majo 2020, provizora laboristino en vaska urbodomo estis eloficigita, pro la fakto, ke ŝi ne atingis sufiĉe bonan nivelon de la vaska lingvo, ankaŭ nomata eŭska. La urbodomo atentigis, ke en la momento kiam ŝi eklaboris en la jaro 2014, oni sciigis al ŝi, ke estus necese akiri bonan nivelon de eŭska lingvo post kelkaj jaroj. En la Vaska Aŭtonoma Komunumo kaj la hispana kaj la eŭska lingvoj estas oficialaj.

Dum la lastaj jaroj la laboristino sekvis kursojn de tiu lingvo dum pli ol 1200 horoj, tamen ŝi ne atingis taŭgan nivelon, ŝi superis nur unu el kvar eblaj niveloj rilate la konon de tiu idiomo. Pro tio, la urbodomo eksigis ŝin. La laboristino plendis ĉe jura instanco, kiu ĵus juĝis favore ŝiajn pretendojn. Tiel, en la verdikto la juĝisto asertas, ke nur estas eble eloficigi funkciulon, se estas pruvite, ke oni ne kapablas plenumi la necesajn postulojn de la laborposteno. Tio ne okazis dum la jaroj kiam la funkciulo laboris en la urbodomo, ĉar ŝi neniam donis motivojn por plendo.

Kaj rilate la lingvon, la juĝisto deklaras, ke la urbodomo ne devas forgesi, ke laŭ lingvaj fakuloj, la vaska lingvo troviĝas inter la kvin plej malfacile lerneblaj en la mondo, eĉ en kelkaj listoj ĝi aperas sur la unua posteno. En la juĝo la juĝisto analizas tiun idiomon, tiel li diras, ke temas pri lingvo kiu tute ne rilatas kun aliaj, ĝi evoluis tute izolite kaj ĝi enhavas malfacilan gramatikan strukturon kun vortoj kiuj povas ŝanĝi sian signifon per la aldono de pli ol cent sufiksoj.

Krome, la nuntempa leĝaro de la Vaska Aŭtonoma Komunumo kiu celas normaligi la uzon de ties lingvo, akceptas, ke la plej maljunaj laboristoj, tiuj kiuj ne sekvis kursojn de la vaska lingvo dum infan-aĝo, ne devige devas lerni ĝin matur-aĝe.



# *Vorto de la Semajno*

**Akcidento:** Malfeliĉa okazaĵo, kaŭzanta materiajn aŭ korpajn damaĝojn.

*La advokato prezentis plendon ĉe juĝa instanco, ĉar lia kliento suferis akcidenton sur la strato.*

**Laborakcidento**: Ĉia vundo aŭ korpodifekto, ricevita dum la profesia laboro aŭ dum la irado inter la hejmo kaj la laborloko.



Laŭ statistiko de la Internacia Organizaĵo de Laboro pli ol unu miliono da homoj mortas ĉiujare pro laborakcidentoj

INTERNACIA JURISTA ESPERANTO-ASOCIO celas:

- Praktike kaj science uzi Esperanton sur ĉiuj branĉoj de la Juro.
- Videbligi Esperanton en juraj kaj ne-juraj medioj pere de informado kaj interkomunikado.
- Strebi al justeco, laŭleĝeco, homaj rajtoj kaj demokratio, ankaŭ ĉe oficialaj instancoj, naciaj aŭ internaciaj, en la mondo.